

Juna Esperantisto

Monata Gazeto Beletristika
por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50.

38, rue Lacépède — PARIS — rue Lacépède, 38

VENĜETO

Unu talentplena pentristo havis edzinon, kiu posedis belan hundeton. Unufoje tiu favorito malsaniĝis. La sinjorino, ĉagrenita, eĉ ne volis aŭdi pri bestkuracisto, sed petis la edzon, ke li alvenigu plej eminentan medicindoktoron, kiu estas en la urbo.

Post nelonge alveturis la doktoro. La dommastro iris en la antaŭĉambron, por lin saluti kaj enkonduki en la kabineton, kie sur sofo sidis malgaja sinjorino kaj apud ŝi, sur la velura kuseno, kuŝis kunvolviĝinta hundeto, kiun skuadis tremado.

— Kiu do estas malsana? — demandis la doktoro, ĉirkaŭrigardante en la ĉambro; kaj kiam la sinjorino ekmontris la hundeton, li ekmordis sian lipon iom ofendita. Sed nenion pri tio dirinte, li proksimiĝis al la besteto, ĉirkaŭpalpis ĝin delikate, esploris la pulson, konstatis febron kaj stomakan mukiĝon. Li receptis pulvorojn por interna uzado en lakto, trifoje dum tago, rekomendis dieton kaj promenadon en freŝaero.

Fine, li adiaŭis tre ĝentile la gesinjorojn, rifuzante akcepton de ia ajn honorario. La pentristo rekondukis lin ĝis la pordego, certigante, ke en konvena tempo, li penos montri al la doktoro sian dankemecon.

Pasis kelkaj semajnoj. La hundeto de l'pentristedzino estis tute resaniĝinta. La gesinjoroj ĵus interparolis pri la helpo, kion al ĝi donis la doktoro, kiam antaŭ la domo haltis veturilo kaj tuj poste, venis en la ĉambron la lakeo de l'doktoro, kun bileto, sur kiu la pentristo legis tiujn ĉi vortojn: « Mi vin petas, sinjoro, je alveturo, pro afero rilatanta vian arttalenton. — D-ro N. »

La pentristo pensis, ke temas ĉi-tie pri mendo de ia

bildo, aŭ io simila, kaj prepariĝinte en unu minuto, li forveturis. La doktoro lin akceptis tre kompleze, kaj post momento, kiam la artisto lin demandis pri la ĝusta afero, li kondukis lin en la najbaran salonon kaj montrante pordon, sur kiu la olea koloro estis jam en multaj lokoj frotita, li diris trankvile :

— Ŝajnas al mi, ke kiel pentristo vi bonvolos preni sur vin la laboron refreŝigi tiun ĉi pordon, per olea tinkturo kaj peniko ?

La artisto mirigita jam malfermis la buŝon por fari malafablan respondon, kiam subite, rememorinte pri la vizito de l' doktoro por hundkuracado kaj pri sia propra promeso repagi lin iam, li eksilentis, klinis konsente la kapon kaj nur diris :

— Kun plej granda plezuro.

Poste, li pretiĝis senprokraste al laboro. Alveniginte el sia domo ĉiujn pentrilojn, li enfermis sin en la ĉambro, neniu enlasante, kaj post kelkaj tagoj, kiam ĝia verko estis finita, kaj la doktoro kun sia familio eniris, por ĝin observi, oni ekvidis veran ĉefverkon. Ambaŭ duonoj de l' pordo estis surkovritaj per mirindkoloraj florbukedoj kaj girlandoj pentritaj tiel naturfidele, ke ili ŝajnis veraj.

Oni ŝtoniĝis pro ekmiro. Tiam la pentristo diris ĝoje al la doktoro :

— Sinjoro frato, ĉu mi do ne sukcesis dece al vi repagi vian afablecon, kvankam — vi mem ĝin konfesos — via invito enhavis iom da malico, kaj en la mia estis nur la deziro kontentigi la kapriceton de mia kara edzino.

HELENA HEMPEL.

Marcel Merckens

« Juna Esperantisto » kun doloro sciigas sian legantaron pri la tre bedaŭrinda morto de unu el siaj ĉefaj kunlaborantoj, S-ro M. Merckens, kiu, 37-jara, mortis en Parizo, dum la nokto inter la 19—20. de Majo lasta. Lia morto estas profunde kortuŝa : el sia loĝurbo Avon li venis Parizon por definitive presarangi sian verktradukajon « La Vendetta » (de Balzac), kaj tie lin subite atingis lia malnova pulmomalsano, kiu lin igis morti post du tagoj. Je lia enterigo, la 21-an de Majo, S-ro Th. Cart eldiris emocian paroladon, memorante pri la servoj faritaj al Esperanto de la amata, neforgesebla amiko.

Nian plej sinceran kondolencon al lia familio!

La Red.

GARDENISTO KAJ KOKINOJ

Fablo.

« Ĉu la Zamenhofs *Fundamento* restu, kiel intencite, netusebla aŭ ne? » . . .

Foje ĝardenisto kun kokinoj
Faris intertrakton pri ĝardeno.
Li permesis, en plej largaj finoj,
Al kortbirdoj logi en bieno;
Manĝi vermojn, raŭpojn; fari nestojn;
Casi muŝojn kaj aliajn bestojn;
Sed ne rajtis ili en la tero
Skrapi, froti, ungojrati, fosi,
Por ke ne okazu malprospero,
Malutilo, vundoj, batoj, premoj
Al la junaj plantoj, ĝermoj, semoj,
Devigante lin kradpordon ŝlosi.

Ĉiuj do konsentis tuj koncerne
Teron, ke ĝi restu absolute,
Firme nefrotebla por eterne,
Leĝe neskrabebla, sendispute.

Kelkaj, kiuj ja plej laŭte klukis
Pri neungogratebleco, jukis
Pro la skrapvolupto, kaj kondukis
Anojn al malpermesitaj faroj.
Jen, ĉi-tiu bando de korsaroj
Kaptis tutajn bedojn; la barbaroj
Ŝiris ilin tiel, ke riparoj
Tute nefareblaj estis. Tiam
Venis ĝardenisto kun indigno.
(Ĝin elvekas perfideco ĉiam)
Vipon portis li el forta ligno,
Pelis ilin for per puna signo.

Kriis kelkaj: « Ni ne rompis teron,
Nur esploris, serĉis la aferon
Por enketon fari pri la lokoj
Nune rifuzitaj al la kokoj,
Kaj science vojojn do konstati,
Se ni iam ajn rajtiĝos grati. »

Kaj aliaj diris: « Li forpelis
Tiujn, kiuj tute ne ribelis.
Ĉiam fidelecon ni proklamis,
Kaj la decojn, konvenecojn amis.
Nur la bedojn volis ni rektigi,
Kaj naturan vivon nur instigi. »

Sed la ĝardenisto ne atentis
Kion ili tede argumentis,
Ĉar, dum buŝo dolĉe parolaĉis,
Al piedo ruinigi plaĉis
Bedojn per senĉesa ungojrato,
Spite de konita la traktato,
Kaj la teron kiel polonebulon
Ili ŝutis al li en okulon.

Fine devis fermi li ĝardenon
Kontraŭ kokoj kiel la Edenon.

Lojaleco per piedo
Same kiel per la lipoj,
Estas nepre la procedo
Por la homo kun principoj.

LOUIS F. NEWCOMB.

LA DIABLO KAJ LIA HELPANTO

Bulgara popolfabelo.

Unu homo kondukis sian filon por aranĝi lin je metio. Iradis, iradis ili, kaj al la homo ektedis, li laciĝis. Li sidiĝis sur ŝtonon por ripozi kaj diris: « Oh! » El sub la ŝtono eliris diablo kaj diris al li:

« Kial ci min vokas? »

« Mi neniam cin vokis », respondis la homo.

« Ne, ci vokis min, mia nomo estas Oh ».

« Mi sidiĝis por ripozi kaj diris: « oh », mi cin ne vokis ».

La diablo demandis: .

« Kien ci kondukas tiun ĉi knabon ? »

« Por instrui al li metion. »

« Donu lin al mi », diris la diablo, « mi instruos al li tre bonan metion. »

La homo donis sian knabon kaj foriris. La diablo enkondukis la knabon sub la teron, en siajn domojn, komencis instrui lin. Kiam la diablo iris ien, lia fratino vokis la knabon kaj diris:

« Aŭdu, kara knabo ! la diablo instruos cin kaj poste li cin demandos, ĉu ci ellernis jam tion, sed ci diru neniam, ke ci ellernis ion, ĉar se ci diros: “ jes, mi ellernis ”, li cin manĝos. »

La knabo ellernis fari ĉion, kion povis fari la diablo, sed ĉiam, kiam tiu ĉi lin demandis, li respondis, ke li nenion scias.

Post ioma tempo la patro ekiris por vidi sian filon kaj alporti al li vestojn por revestiĝo. Veninte ĉe la ŝtonon, li sidiĝis kaj diris: « Oh ! » La diablo tuj eliris kaj demandis la homon, kial li venis.

« Mi venis » respondis la homo, « por vidi mian knabon kaj alportis al li vestojn por vestiĝo. »

La diablo diris: « Tre malsaga estas, homo, cia knabo: li nenion povas ellerni. »

« Tamen », respondis la homo, « li eliru, por ke mi vidu lin. »

La knabo eliris, kaj la homo diris al la diablo: « Donu lin al mi, mi rekondukos lin ĉe lian patrinon, ĉar ŝi multe ploras por li, kaj poste mi ree alkondukos lin. »

« Prenu lin », diris la diablo, « sed ree alkonduku lin, ĉar li scias nenion. » — La homo prenis sian filon, kaj ili foriris.

Irinte iom, ili vidis komercistojn, kiuj aĉetis brutojn. La knabo diris al sia patro:

« Paĉjo, mi fariĝos bela ĉevalido, ci vendu min al tiuj ĉi komercistoj, sed volu por mi unu plenmanon da ormoneroj kaj ne donu la ŝnureton, per kiu ci min kondukas. »

La knabo ŝanĝis sin je bela ĉevalido; lia patro ekkondukis lin.

La komercistoj renkontis lin kaj demandis: « Ĉu vi vendas tiun ĉi ĉevalidon, frato ? »

« Jes, mi vendas ĝin. »

« Kiom vi volas por ĝi ? »

« Unu plenmanon da ormoneroj. »

Ili donis al li unu plenmanon da ormoneroj kaj prenis la ĉevalidon. La homo foriris, kaj la ĉevalido forkuris en la arbaron kaj fariĝis tie ree knabo. Li atingis sian patron kaj diris: « Ĉu ci vidas tiujn ĉasistojn ? Mi ŝajniĝos min ĉashundo kaj kaptados po du leporoj je unu fojo. Ili ekvolos min aĉeti, kaj ci volu de ili unu plenmanon da ormoneroj. »

Lia patro vendis lin al la ĉasistoj, li kaptis kelkajn leporojn, kaj forkuris, refariĝis knabo, atingis sian patron kaj diris:

« Paĉjo, ci iru antaŭen, mi kaŝigos, ĉar min persekutas la diablo por min manĝi. »

La patro foriris kaj la knabo ŝanĝis sin je fiŝo kun oraj naĝiloj kaj eniris en puton. Lia majstro sciis pri tio, ŝanĝis sin je granda fiŝo kaj eniris la puton. Li renkontadis aliajn fiŝojn kaj ilin demandis: « Ĉu vi ne vidis fiŝon kun oraj naĝiloj? » — « Ni vidis », ili respondis, « sed tre malproksime ». — La diablo pli ekrapidis al la fundo de la puto, renkontis aliajn fiŝojn kaj demandis ilin: « Ĉu vi ne vidis fiŝon kun oraj naĝiloj? » — « Ni vidis », ili respondis, « sed tre malproksime ».

La knabo eliris ĉe la fundo de la akvo kaj vidis tie junulinon, kiu lavis vestojn. La knabo diris al ŝi: « Mi min ŝanĝos je bel-ega ringo, ci prenu min, kaj venos unu homo, kiu volos min aĉeti; ci vendu min por multa mono, sed ne donu min en liajn manojn, sed lasu min fali teren. »

Venis la diablo, donis al la junulino plenmanon da ormoneroj por la ringo, sed ŝi ne donis ĝin en liajn manojn, sed lasis ĝin fali sur teron kaj ĝi fariĝis milio. La diablo ŝanĝis sin je koko kaj komencis manĝadi la milion. Unu grajneto ruletis sub la lav-trogon, fariĝis vulpo kaj manĝis la kokon. La vulpo ree fariĝis knabo, atingis sian patron kaj ili ambaŭ iris en sian hejmon kun plena sako da ormoneroj.

El la bulgara lingvo tradukis AT. D. ATANASOV.

REGIDO-ĜIBULO

Fabelo, de A. V. STERN.

(Fino.)

(Vidu la komencon en nia antaŭa numero.)

Sed subite eksonis rido, komence mallaŭta, poste pli kaj pli laŭtiganta, kaj fine, la popolamaso, ŝanĝema kaj senkompata, ridegis.

— Ĝibulo, ĝibulo, malbelega ĝibulo! — kriis plenaĝuloj kaj infanoj, preskaŭ svenante pro rido.

La ridinda ĝibulo malheligis la belan kantiston-poeton, unu momento — kaj la kantisto estis jam forgesita.

Konfuzita, kun larmoj en la belaj okuloj, staris la reĝido.

Li ne komprenis la signifon de l'vorto « ĝibulo », sed li sentis en ĝi ion ofendan. La rido de l'popolo lin turmentis kaj senvole, serĉante aprobon, la reĝido turnis

la rigardon al ŝi, por kies honoro li verkis la lastan, ĵus kantitan kanton.

Ŝi staris, malsupren klininte la kapon, kovrinte la vizaĝon per la manoj; ankaŭ al ŝi li ŝajnis ridinda; ŝi timis lin rigardi. Frapegita, en freneza malespero, la kantisto ĵetis sur la teron sian liuton, li ne volis plu kanti kaj li saltis de l'alta muro sur la terason. Li facile povus mortbati sin, sed la sorto lin gardis.

Ekscitita, malfeliĉa kaj humiligita, la reĝido-ĝibulo enkuris en la ĉambron de sia patrino.

— Ĝibulo! Kio estas ĝibulo?! — kriis li, premante ŝiajn manojn. — Mi volas scii, kion signifas tiu ĉi vorto? Ĝi estas en mi, ĝi estas kun mi, tiu ĉi vorto, ĝi superis en mi la kantiston, ĝi detruis en mi la feliĉon de mia vivo...

La reĝino, ekaŭdinte tiujn ĉi vortojn de sia amegata filo kaj kompreninte momente, ke ĉiuj ŝiaj penoj, ĉiuj ŝiaj oferoj estis vanaj, svenis.

En la popolamaso, ĉirkaŭanta la kastelon, estis kuracisto, oni lin alvokis por helpi al la reĝino.

— Ĝibulo! ĝibulo! Kio estas ĝibulo!? — ripetadis la reĝido.

La kuracisto ekridetis.

— Ĝibulo, — diris li, — estas jen tio, — kaj li frapetis la dorson de l'reĝido.

Poste li ĉirkaŭrigardis la ĉambron kaj vidinte, ke en ĝi forestas speguloj, eltiris el sia poŝo malgrandan speguleton.

— Bonvolu enrigardi, Via Moŝto.

La unuan fojon la reĝido ekvidis sin kaj terurigis.

Kiam la reĝino rekonsciigis, la filo aliris al ŝi.

— Vi kaŝis de mi la veron, — diris li.

— Mi tutan mian vivon dediĉis al vi, mi forlasis la propran feliĉon...

— Vi kaŝis de mi la veron!

— Vi, vi sola estis mia dio. Nur vian feliĉon mi gardis. Mia amata edzo suferis malproksime de mi. Antaŭ sia morto li vokis min, sed pro vi ne mi fermis liajn okulojn.

— Mia patro mortis? Kaj vi nenion diris al mi pri tio!

— Mi gardis vian feliĉon....

— Por ke en unu tago falu sur min ĉiuj malfeliĉoj ? Tuta via vivo estis malvero. Kaj el malvero vi volis plekti mian feliĉon ? Sed ĉu mi estis feliĉa ? De infanaĝo min allogis la mondo, kaj vi faris min malliberulo, ĉirkaŭis min per muroj.

— Sed vi ja ne sciis pri via kripleco.

La reĝidon tremigis tiuj ĉi vortoj.

— Ho, pli bone estus, se mi sciis pri ĝi, mi ne suferus tiam tielan humiligon. De hodiaŭ mi estas libera. Adiaŭ, patrino, mi iras en la mondon, nenion forportante el tiu ĉi kastelo, eĉ mian liuton mi forĵetis.

— Filo mia, filo mia, — ĝemis la reĝino, — mi fordonis al vi la feliĉon de mia vivo, mi rifuzis la amon, regpotencon pro vi, kaj nun vi min forlasas, sendankemulo !

La junulo kompateme rigardis la patrinon.

— Ho ve, — diris li, — mi ne havas por kio vin danki. La feliĉo, kiun vi volis doni al mi, ne ekzistas, ĝi estas trompo. Nur kiam mi trovos veran feliĉon kaj mian liuton, mi revenos al vi.

Kaj la reĝido ordonis malfermi la pordegon de l'kastelo. La servistoj ne kuraĝis protesti kaj la pordego malfermiĝis antaŭ li.

La reĝido-ĝibulo eliris en la vastan ravan mondon kaj direktis siajn paŝojn al la ĉiam lin loganta maro. La maro estis senbrua kaj silenta sub la matenaj radioj de l'suno. Ĝi respogulis la bluan ĉielon kun irantaj tra ĝi blankaj facilaj nubetoj.

La reĝido ensaltis boaton, prenis remilon kaj foriĝis de la bordo. Apenaŭ forreminte, li ekvidis sian respogulaĵon en la diafana tranĝvila akvo. Li deflankiĝis, sed sur la alia flanko ekvidis la samon.

Tiam la reĝido diris al si :

— La ĝibo ĉiam restos kun mi, sed mi devenas el reĝa gento, mi estas kuraĝa, oni devas kuraĝe sin rigardi kaj kutimiĝi al si.

Kaj li rigardis sian respogulaĵon tiom longe, ĝis li tute kutimiĝis al ĝi.

La rekontiĝantaj fiŝkaptistoj kriis al li ofendan alnomon kaj mokis lin ; sed, ridetante, li nur balancis la kapon.

— Oni devas kutimiĝi, oni devas kutimiĝi

Reĝido-ĝibulo loĝiĝis sur la bordo, apud la blua maro mem. Unu juna fiŝkaptistino instruis lin plekti retojn por la fiŝoj kaj jen li komencis frumatene veturi kun aliaj fiŝkaptistoj kapti fiŝojn en la maro, kaj la fiŝkaptistoj kutimiĝis al li. Ili nomis lin Ĝibulo, sed ili ĝentile lin salutis kaj ne enviis je lia riĉa kaptajo: la reĝido ĉiam havis prosperon en la fiŝkaptado. Vespere kaj en festotagoj matene, la boato de Ĝibulo alnaĝadis al apudbordaj urboj kaj vilaĝoj, la juna fiŝkaptisto iradis sur la stratoj, gaje ŝercante, li proponis siajn fiŝojn kaj kantis:

Ĉu ne vidis iu,
Ĉu ne levis iu
La liuton oran?
Eksilentis sen liut' kantisto,
Ho, redonu kanton al kantisto,
Bonaj homoj!

La urbanoj kaj vilaĝanoj kutimiĝis al juna Ĝibulo. Lin oni jam ne plu mokis, kaj liaj fiŝoj ĉiam rapide disvendiĝis. « La Ĝibulo estas honesta homo, — parolis la aĉetantoj, — liaj fiŝoj estas bonaj kaj ne multekostaj ». Sed je la demando pri liuto ĉiuj nur malgaje nee skuis la kapojn.

Neniu vidis, neniu levis lian liuton. Kaj tiel pasis multe da jaroj.

Unu fojon printempe, kiam Ĝibulo iris sur ĉarma strato de granda urbo kaj, laŭkutime, kantis:

Ĉu ne vidis iu,
Ĉu ne levis iu
La liuton oran?...

al liaj piedoj falis brodita tuketo.

Li ĝin levis kaj ekrigardis supren; sur la balkono, sin apoginte al balustrado, staris knabino blanke vestita, knabino mirinde bela. La reĝido tuj rekonis en ŝi tiun, kiun li iam prikantis sub la nomo « Lilio ». Nun ŝi ne kaŝis sian vizaĝon. Ŝi rigardis en la okulojn de Ĝibulo kaj ŝiaj okuloj brilis pro ĝojo.

— Mi rekonis vin, — diris ŝi, — vian liuton mi levis kaj kaŝis. Venu ĉi-tien, mi redonos al vi la liuton.

La reĝido supreniris ŝtupare kaj falis al la piedoj de l' knabino.

— Ĉu mi ne timigas vin ? ĉu vi ne fermas la okulojn, ekvidante la ĝibulon ?

— Ho, ne, — diris ŝi, — mi estas tiel feliĉa, tiel ĝoja, ke mi vin renkontis. Mi forgesis pri via ĝibo kaj nun mi ĝin ne vidas, por mi vi estas nur la plej bela poeto, mi memoras nur vian kanton, ĝi sonas en mia animo. Aŭskultu, mi ĉion rakontos al vi.

« Kiam vi kantis sur la teraso de l'kastelo kaj mi venadis matene vin aŭdi, via voĉo kaj vortoj de via kanto penetris en mian animon. Kaj mi vin ekamis. Mia imago pentris vin al mi kiel plej belan el la homoj, kaj mi deziris vin vidi.

« Kiam la popolo postulis vian eliron, mi kriis, eble, pli laŭte, ol ĉiuj.

« Kaj jen vi eliris, eliris fiere kun kapo levita, kaj mi ekstremis, ekvidinte vian malbelecon. La idolo, kreita de mia fantazio, detruigis en unu momento. Kaj mi kovris mian vizaĝon per la manoj, por vin ne vidi.

« Mi aŭdis ridon kaj fajfon de la homoj kaj tio ĉi ankoraŭ pli multe certigis al mi, ke mia idolo falis.

« Kiam mi malfermis la okulojn, vi jam forestis, sed en la polvo kuŝis via liuto. Mi levis ĝin kaj la saman tagon mi forveturis sur fornaĝanta ŝipo el tiu lando.

« Mi pensis, ke malproksime de tiuj lokoj mi baldaŭ forgesos la ridindan ĝibulon kaj lian ravan kanton. Sur la fundon de kofro mi kaŝis la liuton.

« Sed la ventegoj skuis mian ŝipon, neniam viditaj landoj sin etendadis antaŭ mi, kaj mi ĉiam memoris la momenton, kiam mi vin ekvidis kaj koleris kontraŭ vi. Por kio vi rompis mian revon ? Sed kune kun rememoro pri vi reviviĝis via kanto, ĝi ĉiam sonis en mia animo, ĉiam pli kaj pli forte ĝi min posedis. Mi pelis ĝin, mi ŝtopis miajn orelojn, mi volis elŝiri ĝin el la koro, sed, ĝi ne lasis min. Ĝi luladis min kiam mi dormis, ĝi vekigadis kune kun mi, ĝi ĉirkaŭligis min tutan kaj elprenis la figuron de l'ĝibulo. Pasis jaroj, la rememoro pri la ĝibulo malaperis, sed lia kanto sonas. Jen estas la liuto, prenu ĝin, mia kara, kaj kantu. »

Kaj la reĝido ekkantis. Li kantis belan, kortuŝantan kanton pri disiĝo de du amantaj estaĵoj, pri iliaj suferoj kaj pri ĝojo de la renkontiĝo.

Larmoj fluis el la okuloj de l' bela Lilio.

— Tio ĉi estas la unua feliĉa tago de mia vivo, — diris la reĝido. — Ni iru al la patrino, por ke ŝi sciu mian feliĉon....

Ĉio malpleniĝis kaj maljuniĝis ĉirkaŭ la antikva kastelo: apenaŭ malfermiĝis la pordego je la rustiĝintaj ĉarniroj, en la vasta korto elkreskis urtiko, la murojn kovris musko kaj ŝimo. Fulgo nigris la plafonojn de l' salonegoj, kaj araneoj teksis en la anguloj araneaĵojn.

La servistoj tiel maljuniĝis kaj fleksiĝis, kvazaŭ duono de jarcento estus pasinta super iliaj kapoj.

— Sed kie do estas la reĝino? Kie estas mia patrino? — demandis la reĝido.

— Ŝi fermis sin en sia dormoĉambro, kaj ankoraŭ ne forlasadis ĝin post via foriro, — estis la respondo.

Kiam la reĝido eniris la dormoĉambron, renkonte al li leviĝis maljunulino, en kiu li kun malfacilo rekonis sian, antaŭe tiel belan, patrinon.

— Panjo! — diris la reĝido, apenaŭ detenante siajn larmojn, — mi revenis al vi, mi trovis mian feliĉon, mia ĝibo ne estas jam ŝarĝa, ĝi min ne ĝenas plu, mi ne pensas plu pri ĝi. Jen estas mia fianĉino, la ĝibo ne malhelpis, ke ŝi min ekamu. Ŝi redonis al mi la liuton. Panjo, benu nian feliĉon!

La reĝino kun envio rigardis la belan Lilion; ŝi enviis, ke ne al ŝi, kiu fordonis tutan sian vivon por la filo, la sorto permesis fari lin feliĉa.

— Estu feliĉaj, — per malforta voĉo diris la reĝino.

— Vi venu kun ni, ni forkuru el tiu ĉi malpleniĝinta kastelo! La araneoj kovris ĝin per siaj teksaĵoj, ni forkuru el ĝi!

— Foriru en la mondon kun via amatino, kaj lasu min inter tiuj ĉi muroj. Mi ne faris vin feliĉa, — diris la reĝino.

— Sed mi estas feliĉa, varme ekkriis la filo.

— *Ne estas mi*, kiu vin faris feliĉa.

— Via feliĉo estis tro arta, — mallaŭte diris la reĝido, — sed sen vi mi ne ekscius kaj ne taksus alian feliĉon. Estu do benita, patrino.

Kaj li, kun sia fianĉino, genufleksis antaŭ la reĝino.

La maljunulino benis ilin....

Eliris el la kastelo la reĝido kun Lilio. Ili sidiĝis sur facilmovan, rapidan ŝipon kaj foriris en la vastan, luman mondon.

Kaj la patrino-reĝino rigardis de l'alta turo la malproksimiĝantan ŝipon kaj maldolĉaj larmoj fluis el ŝiaj okuloj.

El la rusa lingvo tradukis

GEORGO DEŜKIN.

FELIETONO

El la mondo de l'bestoj.

Leono kaj leporo. — Leono vizitis leporon.

— Ĉu estas vere, — diris la leporo, — ke iliaj leonaj moŝtoj furioze timegas, kiam ili aŭdas krion de koko?

— Jes, — respondis la leono, — ĉiuj ni, eĉ la plej potencaj bestoj, havas naturan malfortajon, neperfektecon. Ekzemple, kiel vi versaĵne scias, la elefanto preskaŭ freneziĝas aŭdante rukturmuron de porko.

— Efektive, — interrompis la leporo, — nun mi ekkomprenas, kial mi sentas tiel grandan timon, kiam mi aŭdas bojon de ĉashundoj.

La kruela sovaĝbesto. — La herboj sur la kampo timege ekstremis pro teruro.

— Ho kia malfeliĉego! — diris ili malespere. — Vidu, kolegoj, vidu tiun kruelan sovaĝbeston, kiu tie alproksimiĝas al ni. Kiel senkompata ĝi estas, la terurulo! Ĝi nin detruas, krulege mortigas per siaj abomenaj arkaj dentoj! Ve al ni, ho ve al ni! morton ĝi alportas por ni, neeviteblan, teruran morton! Estu malbenita, ci, sovaĝa krulegulo!... Kaj vidu kolegoj, tiun alian, kiel aminda ĝi estas, ĝi, la delikateco, la bonanimeco enkorpiĝinta! Ĝi neniam tuŝas nin, ĝi favoras nin, ĝi indulgas nin, ĝi ne vundas nin, ĝi amas nin, ĝi, la nobla bonkorulo! Benon al vi, adorinda, milda protektanto!...

... La « kruela sovaĝbesto » estis unu ŝafido; kaj la « milda protektanto » — unu tigro.

Gepatra ĝojo. — Gebovoj estas malĝojaj. Hieraŭ oni buĉis ilian filon, Bovidon. La bonkora Virbovo amoplene elkondukas sian edzinon el la stalo, per ŝia korno, delikate, ŝin konsolante. Ili malĝojaj promenas sur la korto de la farmodomo.

Promenante ili alvenas al la kuirdomo; jen kie estas la dis-

pecigita kadavro de ilia kara filo. Patrino Bovino enrigardas en la manĝajejon tra la malfermita fenestro. Kaj jen ŝi tie revidas sian filon Bovidon, en du grandaj platoj: la kapon gelatenigitan, — la piedojn en ĵuskuirita saŭco, ankoraŭ varma, vaporetanta.

Larmoj aperas en la okuloj de la kortuŝita patrino Bovino; kun dolora bleko ŝi montras al sia edzo la du platojn kun la « fileroj ». Patro Virbovo rigardas, rigardas ilin kaj kun ĝoja mieno rimarkigas:

— Vidu, edzineto, kiel singarda estas nia kara filo, eĉ post lia morto. Kiel zorge li sekvas la regulojn de la higieno! Jen vidu: kapon malvarme, piedojn varme. . . .

Laŭmemore, el diversaj lingvoj HUGO REGÉCZY.

BIBLIOGRAFIO

La eldonantoj, kiuj deziras, ke ni raportu pri iliaj eldonaĵoj, estas petataj ĉiam sendi donace al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.

Du Noveloj el Maŭro Jókai, el la hungara lingvo tradukis JOHANO DE LUCZENBACHER. 93 p. 13,5 X 19,5. — Paris, Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. Prezo: fr. 1,25 (S 0,50).

Nia juna kunlaboranto, S-ro J. de Luczenbacher, donis al ni elegantan libron: du interesplenajn novelojn el la verkoj de la glora hungara beletristikisto Jókai, kies nomo sennecesigas ĉian laŭdreklamon. Tiuj du noveloj havas strangan temon, ili preskaŭ trapaŝas la limojn de la ebla verŝajneco, sed la fantazioriča aŭtoro ĉiam lerte sukcesas konservi la kredeblecon. La tradukinto klopodis fidele redoni en Esperanto la mirinde simplebelan stilon de Jókai, kaj li bone sukcesis pri tio, kvankam li uzas nur Zamenhofajn vortojn en sia traduko. En la verko ni trovas ankaŭ multajn laŭvorte tradukitajn *kunmetitajn* vortojn, kiuj ne estis ankoraŭ renkontataj en la esperanta literaturo, sed kiuj estas tute perfekte faritaj laŭ la reguloj de la « Fundamento »; cetere tiu tasko ne estis tro malfacila, ĉar la vortfarado en Esperanto (per afiksoj, prefiksoj, vortkunmetoj) ja estas tutsama, kiel en la hungara lingvo. Kaj vere, la vortfarado estas unu el la plej ĉefaj ĉarmoj de Esperanto; ĝi sennecesigas la enkondukon de senutilaj novaj vortoj kaj tiamaniere ĝi severe gardas la unuecon de nia lingvo. Tial la libreto bone taŭgas por tiuj multaj samideanoj, kiuj rajte plendas pro la multaj, de ili nuntempe renkontataj vortoj trovigantaj nek en la Universala Vortaro, nek en la Akademia Aldono, kaj ne estas internaciaj. S-ro de Luczenbacher, restanta fidela al nia « Fundamento », plene meritas nian laŭdon kaj gratulon.

Esperanto. Fidela Deklaracio pri la Vero elmontrita laŭ la Sankta Biblio (la neerareblaj Skriboj), kaj distinginda de la kredo populara, kiu, tute pruveble, multe konsistas el la fabloj, kiujn venontajn la Apostolo Paŭlo prediris. 52 p. 13 X 18. — Melbourne (Aŭstralio), Atlas Press, Fleming Place.

Jen la antaŭparoletto de tiu ĉi moral-religia verko: « Kara Leganto, Samideano, Amiko! M. B. E. A. petas vin legi ĉi-tion diligente, ĉar la afero estas tre grava, kaj via sciigo de la Bela Internacia Lingvo povas doni al vi la Veron de la Neerarebla Libro. Precipe bonvolu ne kondami antaŭ ol legi ĉion. — *Kun Espero.* »

Sableroj, de MARIE HANKEL. 92 p. 10 × 14. — Verlag Deutsche Esperanto-Buchhandlung, Leipzig. Prezo : 0,30 S.

La belaspekta volumeto enhavas 23 poeziojn, 24 prozaĵojn kaj unu muzikaĵon, verkitaĵn de nia fame konata samideano. Ni tre varme rekomendas tiun ĉi verkon, kies stilo kaj lingvo estas perfektaj.

Patrino Anserino, tradukita de WINIFRED SACKVILLE STONER. 28 p. 11 × 18. — Esperanto-Oficejo, Washington D. C. (U. S. A.).

Tiu ĉi tre lukse presita broŝureto enhavas infanajn poezietojn, tradukitaĵn de *sesjara knabineto*, kies portreto ornamas la titolpaĝon.

Cours méthodique d'Esperanto, Corrigé des Thèmes, de C. AYMONIER et E. GROSJEAN-MAUPIN. 90 p. 12 × 18. — Paris, Hachette & C^e, 79, boulevard Saint-Germain. Prezo : fr. 1,20 (S 0,48).

Traduka helpilo por la lernolibro de l' samaj aŭtoroj.

PEDAGOGIA FAKO

(Volonte ni respondas al niaj abonantoj en tiu ĉi rubriko iliajn lingvajn demandojn komune interesajn.)

Kiu ajn, ĉiu ajn, iu ajn. — DEMANDO : ... Mi ofte renkontas ĉe okcidenteŭropaj esperantistoj aldonadon de partikulo « ajn » al laŭplaĉa pronomo; sed tian uzadon mi juĝas nekorekta kaj kontraŭfundamenta, ĉar en la Fundamento (Ekzercaro, § 30 : 8) estas dirite simple, mal-longe kaj klare : « Aldonante al la vortoj *demandaj* la vorton "ajn", ni ricevas vortojn sendiferencajn : *kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn* » (kaj sole, aliaj ne estas montritaj). El kio do oni konkludis, ke oni povas aldoni la partikulon « ajn » al aliaj pronomoj? Mi tion tute ne komprenas kaj ankaŭ mi ne povas kompreni, kia diferenco aŭ almenaŭ nuanco de senco povas ekzisti inter la vortoj « kiu ajn » kaj « iu ajn », inter « ĉiu » kaj « ĉiu ajn » ... — *Maksim Bulockin*.

RESPONDO : Kio ne estas malpermesita en la Fundamento, tio estas permesita; la plenditaj de vi uzmanieroj ne estas do konsider-eblaj kiel kontraŭfundamentaj. — Tiu uzmaniero estas jam sufiĉe for-tike konfirmata de la ĝenerala kutimo; sed al mi ŝajnas tamen iom dube, ĉu ĝi alportas iun utilon al nia lingvo. « *Kiu ajn* » esence signi-fikas : « iu nedifinita persono el nedifinita personaro »; « *ĉiu ajn* » ŝajnas signifi : « iu nedifinita persono el difinita aŭ difinebla personaro ». Ek-zemplo : « *kio ajn* havas la rajton sin enskribigi en tiun societon » : — « *ĉiu ajn* havas la rajton ekzisti en tiu societo ». En tiu lasta ek-zemplo la partikulo « ajn » havas rolon nur atentigi la leganton pri la absoluta nedifiniteco de la preparolata persono; inter « ĉiu ajn » kaj « ĉiu » ne estas alia, senca diferenco. — Inter « *kio ajn* » kaj « *iu ajn* », unuavide, apenaŭ montriĝas ia nuanca diferenco; tamen, post medit-ado, mi trovas, ke tiu ĉi lasta esprimo surportas sur si plian nedi-finitecon, ol « *kio ajn* ». Ni supozu, ke la societo aludita en la pli supra ekzemplo estas *esperantista societo* : tiam, la « *kio ajn* » signifas nepre iun nedifinitan esperantiston, estantan aŭ estontan, kiu ne estas membro de la dirita societo : kaj se ni dirus, ke : « *iu ajn* havas la rajton sin enskribigi en tiun societon », tio ĉi eble signifus, ke eĉ neesperantistoj rajtas membriĝi.

Mi konfesas, ke mi ne tre ŝatas tiun ĉi troprecizigitan nuancdistingon, ĉar vere, ĝi ne estas necesa. Cetere, ne nur okcidenteŭropaj, sed ankaŭ aliaj esperantistoj uzas la ĵus priparolitajn esprimojn; tiel ekzemple, unu el ili troviĝas ankaŭ en nia maja numero (76-a paĝo, 20-a linio), el la plumo de vialanda (rusa) samideano. P. DE L.

Pri aliaj lingvaj demandoj ni parolos en la venonta numero.

HUMORAĴOJ

La utilo de l'alkoholo. — *La pastro*: Aj, aj, mastro Johano, vi denove estas ebria! ĉu vi ne scias, ke la alkoholo plimallongigas la ekzistotempon de la korpo? — *Mastro Johano*: Kontraŭe, via pastra moŝto, la alkoholo plilongigas ĝin; la vermoj en la muzeoj estas ja tiel longedaŭraj, ĉar ili estas konservitaj en alkoholo. — *La pastro*: Bone, bone; ŝajnas al mi, ke vi ĉerpis tiun ĉi respondon el la decembra numero de « Juna Esperantisto ». Sed pripensu, ke la muzeaj vermoj estas mortintaj; alkoholo ja konservas mortintajn korpojn, sed ĝi detruas vivantajn; do, se vi uzos ĝin nur por konservi vian kadavron, ĝi ne malutilos. — (E. ANDREWS.)

Rekonigilo. — « Sinjoro, bonvolu diri al mi, kie loĝas dentisto, kiu sen doloro eltiras la dentojn. » — « Jes, sinjoro. Iru dekstren en la duan straton, proksimume ĝis la deka domo; tie vi aŭdos jam de malproksime la dolorkriojn de la operaciataj pacientoj. »

Trafe plenumita tasko. — En lernejo, dum horo de redaktado, la instruisto donas lecionan taskon ellaborotan pri la sekvanta temo: « La rezultato de mallaboremo ».

Post la finiĝo de l' horo, li kunkolektas la laborfoliojn de la lernantoj. Li tiam rimarkas, ke knabo Malagul transdonas al li blankan paperfolion neskribitan.

— Vi ja nenion skribis, — li riproĉas la knabon. — Kio do estas tio ĉi?

— Tio ĉi, — respondis Malagul trankvile, — estas la rezultato de mallaboremo.

En restoracio. — Kelnero, donu al mi porcion da rostita fiŝaĵo... aŭ ne! donu prefere pecon de bovlumbajo. Mi ne tre fidas vian fiŝaĵon, ĉar vi aĉetas fiŝojn mortintajn.

Kelnero: Kaj ĉu vi pensas, ke bovojn ni aĉetas vivantajn?

Korekto. — Du amikoj, ĉeestantaj vesperkunvenon, interparolas: — Vidu, amiko, tie, ĉe la tria tablo dekstre, tiun hidrocefalulon. Kian malsaĝegan mienon li havas! ĉu vi ne konas lin?

— Li estas mia frato, — respondas la alia, iom konfuze.

— Via frato? Tiu akvokapulo? tiu idioto?

— Jes, li estas mia frato, — respondas la alia, iom ĉagrenite.

— Vere, vere, — balbutas nun la amiko, — mi estus devinta rimarki tion per la simileco.

Rapideco. — S-ro Senharovski eniras kvazaŭ fulme en barbirejon. « Mi devas tre rapidi; ĉu vi povus min razi ne formetinte mian kolumon? » — « Certe jes, sinjoro Senharovski! mi povas eĉ vin kombi ne formetinte vian ĉapelon. »

Laŭkvalite. — « Kiel, doktoro? Dudek frankojn por eltiri tiun ĉi salman fiŝoston el mia gorgo! » — « Kompreneble, sinjoro. Por haringa fiŝosto vi pagus nur unu frankon. Sed ĝi estas salma... ja, oni devas pagi la lukson. »

El la fiziko. — Instruisto klarigas al la lernantoj, ke la varmo streĉas kaj la malvarmo malstreĉas.

— Tial estas do, — diras trointeligenta bubo, — ke somere la tagoj estas longaj kaj vintre mallongaj.

La homo. — *Leporido*: Diru, panjo, pri kio oni povas rekoni la homon? — *Leporino*: Se vi vidas vestitan monstron, kiu portas pafilon kaj vin mortpafas: vi povas esti certa, ke ĝi estas homo.

Distrite. — *Profesoro A.*: Estas terure! Mi ne scias, kien mi metis mian okulvitron. — *Profesoro B.*: Ĉu vi nepre bezonas ĝin tuj? — *A.*: Kompreneble. Sen ĝi mi ne vidas sufiĉe klare por serĉi ĝin.

NIAJ KONKURSOJ

Kutime ni donas ĉe ĉiu konkurso du premiojn al la partoprenantoj de niaj konkursoj, t. e. 1) el libroj eldonitaj de Presa Esperantista Societo, en valoro de 2 S, — 2) samon en valoro de 1 S, — laŭ elekto de la premiotoj.

Jen la respondoj pri nia februara konkurso, kun la nomoj de iliaj aŭtoroj:

1) Multestimata Ĉefredaktoro! Respektinda Samideano!

Bonvolu, zorgoplene traleginte, konkursaĵe envicigi jensenditan centvortan sciigon seninteresan:

Miaurba malgranda grupeto esperantistina, dujara, enhavanta tridek diversnaciajn aninojn, kunvenis lastmardon antaŭtagmeze. — Antaŭdifinita tagordo: Estrava renovigo laŭregulara. Prezidantino, subskribinta sekretariino, vicsekretariino, kasistino, bibliotekistino: reelektitaj; vicprezidantino, direktorino: novelektitaj; komitatanoj: plejparte reelektitaj; noveveninta eksterlanda fraŭlino novelektita. Librara pligrandigo interkonsentita. Unujara luprezo antaŭpagita. Alpagitaj kotizaĵoj enkasigitaj; nepagintaj grupanoj alvokitaj; dekunu aliĝintinoj enskribitaj; formigrinta sinjorino eksigis. — Malmultaj, negravaj projektetoj preparolitaj, sendiskute malakceptitaj. — Kunveno finiĝis tagmeze.

Klariga rimarketo. — Plisupra, konkursaĵe publikigota sciigo enhavas elpensitan neveraĵon artefaritan, esperigante premiigi dunome subskribintinon.

Tutkoran samideanan bondeziron, internacian amikaĵon!

Vidvino KILLER-ROSENZWEIG

germanlingva legantino,
malgrandurba knabillerneja instruistino.

2) Ĉiekonata sinjorino advokatedzino miaurba, malpacema, disputema, kolerema, mallaborema, konkludeble neestimata, surstariĝinte siakortan rubmonteton malpuran, senorde amasigitan, laŭtege diskriadiis, ekintencante revoki malespere forkurintan, depost antaŭhieraŭ neretroveblan servistinon novedungitan. (A. TEODOROVIĈ.)

Ceteraj respondoj. — 3) Plenaĝaj piedirantoj vangharaj, sampatrujanaj ĉevalrajdistoj lipharaj, malsupreniras kontraŭvole limimpostojn; apudstaras tramveturiloj, vapormaŝinoj, pasaĝervagonoj, meblöveturiloj, pakvagonoj, superhavantaj multnombrajn skribmaŝinojn, skribtablojn. (M. Bastoul.) — Nuntempe, interesplena porjunula legmaterialo, zorgmaniere diversaŭtore kunverkita, grandefike antaŭenpuŝas tutmondan helplingvon. (F-ino Odette Meyer.) — 5) Servopreta fervoja staciestro laŭvoĉe atentigas: « Duafoja fajfesignalo; ĝesinjoroj, bonvolu senprokraste envagoniĝi. » (L. Müller.) — 6) Kolegaro! Manpremojn tutkorajn ĉiufanken dissendas samideano verama katalunlingve alnomata « Suŝo-Sonas » (= Solsona). — 7 a) Meznokte birdforma

aerveturilo superpasas Parizurbon, lumjetante ĉiufanken diverskolorajn elektrofajraĵojn. — 7 b) Ĉiumonate plenkuraĝemaj aerveturantoj superflugas markolojn kontraŭstarante malvarmsange plejperfidajn trafluvojn. — 7 c) Finnarte Svislanda Leŝtŝbergtunelo traboriĝis translasante plenuziasmigatajn ĉefingenierojn Franclandajn. — 7 d) Ĉiujare multnombraj samideanoj partoprenas tuktore diverslandajn somerfestojn. (S-ino M. Meylan-Mairet.) — 8) Krimfarinta falslamulo, ekvidinte postkurantajn policanojn, forjetante lambastonojn, facilmove ekkuris. (S-ino Lina Lemberger.) — 9) Bonkonduta malliberulo, ekriĉevinte antaŭtempan forpermeson, larmokule pridankis urbestron. (Emile Prasier.) — 10 a) Interkomprenigilo naskiĝis, homaro gajigiis, scienculojn Esperantismo aprobis, Esperantistojn multigis. — 10 b) Kvinpinta verdstelo klarigadu tutmonde! (Nikolaj Peĉigargov.) — 11) Bonfama dentisto antaŭhierau plensukcese forŝiris dekunu kavigiintajn okuldentojn. (Marcel Prasier.) — 12) Altfirtanta vaglumo, erariginta timeman infanaron, malrapide estingiĝas. (Pupinjo.) — 13) Maljuna ekzekutisto kordolore pendigis mortkondamnitajn mortigistojn. (Maurice Brezin.) — 14. Frandema sinjorino genealezidino malŝatas nelertajn kuirstinojn. (R. Hedborg.) — 15 a) Altkreska laboristo eniris ĉefurban preĝejon. — 15 b) Internacia interkomprenilo plifeliĝis tutmondan homaron. (J. Luber.) — 16) Laborema servistino purigas polvokovritajn bildokadrojn. (Ivan Probojĉević.) — 17) Grosjean-Maupina vortaro enhavas multnombrajn riproĉindaĵojn. (H. R.) — 18 a) Propramana subskribo egalvaloras monsumon. — 18 b) Nunjare kurperdiĝis brunkolora ĉashundo. — 18 c) Bonkora manpremo: kva-zaŭparola amesprimo. (V. Cimr.) — 19. Esperantistinoj malŝatas sensencan malamon. (J. Lubakéry.) — 20) Suferiga kapdoloro malhelpas pripensadon. (F-ino Proksch.) — Fruktoĉa pomarbo forfaligis foliaron. (F-ino L. Hall.) — 22) Malfacile solvebla konkursproblemo kaprompas. (Fuŝproblemisto.) — 23) Orelsonoriga vangofrapo treege dolorigas. (Aglido.) — 24) Magazenestro disvendadas unuakvalitajn vestobjektojn. (Herm. Quittner.) — 25) Neeble preparoli malbonintencajn ŝanĝprojektojn. (V. N. Gibeaux.) — 26) Juĝistaro malkondamnis kulpigiton. (W. Baader.)

Ni rememorigas al niaj legantoj, ke la templimo de nia aprila konkurso estas la 1-a de Julio 1911.

Korespondado de la Redakcio.

Niajn kunlaborantojn ni atentigas, ke ni, dum la lastaj monatoj, ricevis multe da longaj presindaĵoj. Ni do petas ilin, ke ili prefere sendu al ni mallongajn artikolojn (unu- aŭ du-paĝajn), laŭeble literaturajn, ĉar per longaj rakontoj ni estas troe provizitaj por longa tempo; aliparte, ni jam spertis, ke mallongaj legaĵoj estas pli ŝatataj de la legantoj, ol la longaj rakontoj. — Ankaŭ per poezioj ni estas sufiĉe provizitaj.

« *Kvar tagoj* », de V. Garŝin, jam aperis en la esp. literaturo, antaŭ 15 jaroj, en la traduko de N. Kazi-Girej, kun « *Attalea Princeps* ». Ni do ne deziras ĝin publikigi. — Saluton!

« *Pentanta pekulo* » aperis en hungara traduko, kun la rimarko, ke ĝi estas tradukita el Esperanto kaj ĉerpita el « *Juna Esperantisto* ».

D. H. Th. — Ĝi estas pseŭdonimo de konata samideano.

L. H. (Moh.-Pod.) — Ni sendis al vi nian katalogon, vi rajtas elekti el ĝi kiun ajn verkon aŭ verkojn, kies prezo ne superas 0,50 ₯ (= 1 fr. 25 c.). Se la prezo de la elektita(j) verko(j) superus la ĵus diritan sumon, vi devus pagi la diferencon. — Saluton!